


## 8-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo)

Kampadejo Presa Minerva  
Carretera a Camajuaní, km 19, Santa Clara, Villa Clara  
25 – 29 marto 2020  
+53 7 640 4484  
acalienes@gmail.com  
www.esperanto.cult.cu



### KARAJ GEAMIKOJ!

Kuba Esperanto-Asocio invitas vin ĉeesti la jaran kunvenon de la kuba esperantistaro, kiu en 2020 okazos en la centra regiono de Kubo. La programo de nia tutlanda evento inkluzivas variajn kulturklerigajn erojn. Dum la 8-a KERo okazos i.a. la 36-a Nacia Komitatkunsido, kursoj, ekzamenoj, seminarioj, fakaj kunvenoj, artaj kaj distraj vesperoj. Ne maltrafu la okazon ĝui unikan etoson en bela natura regiono, renkontiĝi, praktiki la lingvon kaj amikumi.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ  
Prezidantino de KEA



### LA KAMPADEJO

Ĝi situas en urbo Santa Clara je 19 km de la urbocentro. Ĝia nomo devenas de la akvobaraĝo Minerva, kiu troviĝas tre proksime. La kampadejo estis inaŭgurita la 30-an de junio 1982 kaj disponas entute pri 22 kabanoj, el kiuj 1 duperona, 13 kvarpersonaj kaj 8 sespersonaj, ĉiuj kun televidilo, ventolilo kaj privata duŝejo/necesejo. La kampadejo disponas pri vendejo, kafejo (kie oni ankaŭ matenmanĝas), restoracio por 44 personoj samtempe dum tagmanĝo kaj vespermanĝo, kun pladoj de la kreola kuirarto. Troveblas tie ankaŭ, sportejo, dancejo, rustika infanparko kaj ĝiaj ĉefaj allogaĵoj estas (rajd-)ekskursoj kaj la ĝuo de naĝejo meze de rava naturo.

### LA EJOJ

**Ludejo.** Tie okazos la 36-a Nacia Komitatkunsido, la kunsidoj kaj prelegoj kiujn devas ĉeesti la plej granda parto de la partoprenantoj, kaj la Akcepto por la ĉeestantaj Membroj-Subtenantoj 2019.

**Palmodom.** Taŭga por kunsidoj, kun malmultaj partoprenantoj.

**Restoracio.** De 09h00 ĝis 12h00 kaj de 15h00 ĝis 18h00 ĝi estos uzbla por kunsidoj kun maksimume 40 partoprenantoj.

### HORAROJ

|             |               |
|-------------|---------------|
| Matenmanĝo  | 08h00 – 09h00 |
| Tagmanĝo    | 12h30 – 14h30 |
| Vespermanĝo | 18h30 – 21h30 |

### TELEKOMUNIKOJ

**Publika telefono.** Ĉe la Administrejo eblas telefoni per telefonkartoj *Propia*.  
**Poŝtelefonoj.** Signalo riceveblas ĉe la restoracio. **Vifio.** Konektebleco ekzistas en kafejo ĉe la vojkruciĝo de Carretera de Camajuaní (je 1 km antaŭ la kampadejo) kaj en la restoracio Presa Minerva (je 1 km en maldekstra direkto, el la enirejo de la kampadejo).

### KABANOJ

Ĉiuj kabanoj disponas pri televidilo kaj ventolilo. En la 4-personaj kabanoj troviĝas unu duetaĝa lito kaj unu duperona lito, dum en la 6-personaj kabanoj troviĝas du duetaĝaj litoj kaj unu duperona lito.



### KIEL ALVENI?

Oni ne antaŭvidas organizi karavanojn kiel dum pasintaj jaroj, tio signifas, ke ĉiuj devas mem, kun sufiĉe da antaŭtempo, prizorgi la ir-kaj revenbiletojn al/el Santa Clara.

Per lokaj aŭtobusoj – en horo kaj loko poste anoncotaj – ni veturos merkrede de Santa Clara ĝis la kampadejo kaj dimanĉe revene.



## KION KUNPORTI?

En via dorsosako ne manku litaĵoj, kapkuseno, bantuko, tualet-artikoloj, bankostumo, poŝlampo, insekticido, sunprotekta ŝmiraĵo, viaj medikamentoj...

## ALIĜKOTIZO POR KUBANOJ

Ĉiuj kiuj pagos antaŭ la 31.12.2019: CUP 250.00, poste CUP 290.00. La aliĝkoto ne estas repagebla!

**Inkluzivitaj servoj:** Veturo Santa Clara–Kampadejo–Santa Clara, restado en 4- aŭ 6-persona kabano, tagmanĝo kaj vespermanĝo. Komitatoj de KEA ricevos repagon de 50 % de la veturkostoj post prezento de la koncerna kvitanco.

## POR EKSTERLANDANOJ

Eksterlandaj esperantistoj estas tre bonvenaj en nia evento. Por tiuj dezirantaj vojaĝi al Kubo, KEA preparis apartan programon kun du variantoj.

### Varianto 1

**Sabato, 21 marto 2020.** Akcepto en la internacia flughaveno de Havano. Veturigo al la loĝejo.

**Dimanĉo, 22 marto 2020.** Matenmanĝo en la E-Centro. Urba promonado en Malnova kaj moderna Havano. Vespermanĝo en la E-Centro.

**Lundo, 23 marto 2020.** Matenmanĝo en la E-Centro. Ekskurso al Viñales. Belvidejo. Vizito al la groto de la Indiano kaj poste al kamparano. Vespermanĝo kaj nokta programo.

**Mardo, 24 marto 2020.** Matenmanĝo kaj reveturo al Havano. Vespermanĝo en la E-Centro.

**Merkredo, 25 marto 2020.** Matenmanĝo en la E-Centro kaj veturo al Santa Clara kun urba promonado kaj vizito al la maŭzoleo Che Guevara. Pluveturo al la 8-a KERo.

**Ĵaŭdo, 26-Sabato 28 marto 2020.** Programo de la 8-a KERo.

**Dimanĉo, 29 marto 2020.** Matenmanĝo kaj veturo al Trinidad kun vizito al la Valo de la sukermuelejoj. Loĝigo en la historia centro de la urbo. Urba promonado kun vizito al muzeoj. Ekskurso al plaĝo Ancón. Vespermanĝo kaj nokta promonado en Trinidad.

**Lundo, 30 marto 2020.** Frua matenmanĝo kaj tuja veturo al Cienfuegos.



kun urba promonado. Pluveturo al Caleta Buena kun bufeda tagmanĝo kaj trinkaĵoj inkluzivitaj. Veturo al Playa Larga. Vespermanĝo kaj nokta promonado.

**Mardo, 31 marto 2020.** Matenmanĝo kaj reveturo al Havano kun libertempo. Vespermanĝo en la E-Centro kaj festo kun havanaj esperantistoj.

**Merkredo, 1 aprilo 2020.** Matenmanĝo kaj libertempo. Veturo al la flughaveno. Reflugo. Fino de la servoj.

### Varianto 2

**Mardo, 24 marto 2020.** Akcepto en la internacia flughaveno de Havano. Veturigo al la loĝejo.

**Merkredo, 25 marto 2020.** Matenmanĝo en la E-Centro kaj veturo al Santa Clara kun urba promonado kaj vizito al la maŭzoleo Che Guevara. Pluveturo al la 8-a KERo.

**Ĵaŭdo, 26-Sabato 28 marto 2020.** Programo de la 8-a KERo.

**Dimanĉo, 29 marto 2020.** Post la matenmanĝo veturo al Trinidad kun vizito al la Valo de la sukermuelejoj. Loĝigo en la historia centro de la urbo. Urba promonado kun vizito al muzeoj. Ekskurso al plaĝo Ancón. Vespermanĝo kaj nokta promonado en Trinidad.

**Lundo, 30 marto 2020.** Frua matenmanĝo kaj tuja veturo al Cienfuegos kun urba promonado. Pluveturo al Caleta Buena kun bufeda tagmanĝo kaj

trinkaĵoj inkluzivitaj. Veturo al Playa Larga. Vespermanĝo kaj nokta promonado.

**Mardo, 31 marto 2020.** Matenmanĝo kaj reveturo al Havano kun libertempo. Vespermanĝo en la E-Centro kaj festo kun havanaj esperantistoj.

**Merkredo, 1 aprilo 2020.** Matenmanĝo kaj libertempo. Veturo al la flughaveno. Reflugo. Fino de la servoj.

## PREZOJ

**Varianto 1:** EUR 350.00. Krompago por loĝado en unupersona ĉambro: EUR 110.00. **Varianto 2:** EUR 180.00 Krompago por loĝado en unupersona ĉambro: EUR 50.00.

**En la prezo estas inkluzivitaj:** ★ Akcepto en la internacia flughaveno de Havano kaj veturigo al la loĝejo. ★ Loĝado en dupersona ĉambro kun klimatizilo/ventolilo kaj privata necesejo/duŝejo. ★ Maten- kaj vespermanĝo. ★ E-ĉiĉerono. ★ Ĉiuj veturoj kaj vizitoj laŭ la programo. ★ Partopreno en la 8-a KERo.

## KIEL PAGI?

**Kubanoj:** Per poŝtmandato adresita al: Pedro Fernández Rodríguez Kuba Esperanto-Asocio Vista Alegre 264, La Víbora 10 de Octubre, 10500 La Habana  
**Eksterlandanoj:** Kontante, en eŭroj, en la oficejo de KEA en Havano.

